



Kajeroj el la Sudo

ISSN 1886-1997

La 34^a jaro



Bulteno de la Hispana Asocio de Laboristoj Esperantistaj

<http://www.gazetoteko.com/kajeroj/k123/k123.html>

Cívitano, kiu ne politikumas, iĝas sklavo



N^o 123^a

Aprilo 2022

Kajeroj**el la Sudo**

Bulteno de la Hispana Asocio de
Laboristoj Esperantistaj (HALE).

Enhavo

Redaktore: Ĉu SU renaskiĝas?....3

Politiko:

Ĉu fino de Imperio?.....5

Kial komencis la milito kontraŭ U?. 12

Socialo:

INmortigoj kaj pura racio.....8

Rakonto beletra:

Tinito.....9

Ke Dio gardu la Reĝon!.....13

La patro de sia amantino.....17

Calle Jabonerías, 6.3º D
30010 Murcia
Hispanio

ISSN 1886-1938 (printita)

Prezidas: **Johano A. Cabezos.**

Redaktas: **Jesuo de las Heras.**

Korektas: **Jozefo Pina.**

Retskribu al: kajeroj@gmail.com

**Pri la enhavo de la
artikoloj respondecas ties
aŭtoroj, ne la redakcio.**

**Ni ne korespondos pri nepetitaj
artikoloj, kvankam ni klopodos
publikigi ĉiun artikolon, kiun ni
trovos interesa kaj kies enhavo
mistraktas nenium personon.**

Kovrilo: De la komenco de la Milito de Ukrainio la Registaro de Hispanio sendis militŝipon Blas de Lezo en la militzonon.

Pagmaniero: aliĝu al HALE kontraŭ €10 jare por ricevi la surpaperan version de nia magazino.

**Se vi deziras kontibui per aliĝo,
kontaktu la redaktoron:
kajeroj@gmail.com**

**Oni povas reprodukti la enhavon, kondicè,
ke oni citu la originon.**

Tute kreita kaj traktita per senpagaj linuksaj rimedoj:
Scribus, Bluefish, BlueGriffon, Gimp, kaj Cyberduck.



Redaktore

Ĉu Sovetunio renaskiĝas?

Oni povas pensi, ke estas troigo pensi, ke Vladimir' Putin estas Rusio, kaj ke ne estas Soveto Supra, kaj sekve ne ekzistas Sovetunio. Sed Lenin' laĵ Ŝtalin', kaj ankaŭ tiuj, kiuj venis en povo post ili escepte — eble— de Miĥail' Gorcov', certe ne bezonis, ke siaj Sovetoj Supraj referendumis kaj apogis tiajn troigajn decidojn, kiujn ili prenis por sklavigi kaj subpremi la popolon, kiu mensogite apogis la puĉon je 1917.

Nu, nun Vladimir' Putin', iama ano de KGB (kontraŭ-revolucia sekreta polico) sukcesis reteni povon senlime, kaj nun postulas, ke Ukrainio revenos en Rusion. Kaj avertas la ceteran mondon, ke se oni helpas tiun junan demokratlan landon, estos nuklea milito. Tio signifas, ke finfine reganto de nukleopova lando jam freneziĝis. Ĉu li fidus je la prudento de la alia mondo, ĉu li prifajfas la estonton, kaj opinias vere, ke se la mondo ne estas komunisma, ĝi ne meritas vivi?

Sed vidante intervjuon al premiero rusa de antaŭ preskaŭ du semanoj, eĉ ne komprenante la rusan lingvon, oni povas eltiri, ke ne temas pri frenezulo. Li serioze

kaj trankvile respondis al demandoj de ĵurnalistoj pri tio, ke NATO intencis surmeti atombomboj je la bordoj de Rusio, kaj li



devis ordoni Armean Operacion en alilandaj sojlo por doni al si sekurecon.

Mi ne dubas, ke pasinta prezidento de Usono (Ĉu Buŝ' patro?) promesis la premieron rusan, ke NATO ne moviĝos eĉ unu centimetron orienten, sed ĝis kie sendependa lando kiel Ĉeĥio aŭ Ukrainio ne povas libere peti la eniron en NATO-n? Ĝis kiu punkto la alianco povas rifuzi tion al ili? NATO-n oni kreis por defendi sin aro da landoj tuj post la Dua Mondmilito, kontraŭ komuna malamiko, kiu tiam estis Sovetunio gvidata de Jozefo Ŝtalin'.

De tiam la mondo ŝanĝis multe, kaj cent militoj poste, Sovetunio ne plu ekzistas, kaj post la lasta Premio de Sovetunio, Miĥajl' Gorbaĉov', venis Boris Jelcin, kaj poste ties heredinto, Vladimir' Putin'.

Tiu lasta asertis antaŭ nelonge, ke oni promesis al li, ke NATO ne progresos orienten, sed nun li trovas, ke oni mensogis al li, ĉar baltaj respublikoj jam estas en NATO, kune kun Pollando. Sed NATO estas defendanta organizaĵo, kaj se aliaj landoj petas eniri ĝin, tio estas pro tio, ke ili temas atakon de alia landoj. Sed se Rusio atakas Ukrainion, tio pravigas la soifon de ekskomunistaj satelitaj landoj por eniri la organizon. Pli inteligenta movo estus, ke Rusio petus eniron en NATO ankaŭ...

Sed la afero certigas, evidente, la gravecon de Rusujo en la mondo. Oni diras en tiu ĉi lando, ke la invado de Ukrainio estas nur

Armea Operacio por certigi la sekurecon de rusoj vivantaj preter sia landlimo, sed mortintoj — ambaŭflanke— kaj elmigro amasa de tiu milita zono estas bedaŭrindaj, kaj devintus eviti. Je la momento, kiam mi verkas ĉi tiun artikolon, la ĉefaj urboj de Ukrainio estas sub atako rusa, kaj almenaŭ unu rusa regimento malaperis, same kiel miloj da vivoj de soldatoj kaj centoj da civiluloj.

La alia flanko diras, ke Vladimir Putin volas restarigi Sovetunion, dum aliaj diras, ke li nur volas esti la Caro de ĉiuj la Rusioj, kaj ne mankas tiuj, kiuj diras veraj stultaĵoj pri la kialoj kaj celoj de la milito en Ukrainio. Mi ĵus legis pri tio, ke Rusio estas la ilo, kiun Dio uzas por bremsi Antikriston.

Sed ni esperantistoj de ĉia nacio devas labori por paco, kaj peni trovi solvon por ke tiu ĉi milito estu for, aŭ almenaŭ ties sekvoj ne estos tro penigaj por homoj.

Ni laboru por paco, kaj senarmigi militon pere de niaj emoj kaj agado pacema, solidara kaj afabla.



Ĉu fino de imperio?

Ŝajnas, ke sonas jam delonge Stamburoj de milito en Eŭropo unuafoje de 30 jaroj. Nun eŭropanoj estas nervozaj, eble pro tio, ke ni vidis militojn el nia sofao pere de televido dum tiu tempo, sen reago kontraŭ tio, ke laŭ la unua kvinono de ĉi tiu jarcento jam okazis 85 militoj en la mondo.

Sed nun la afero tuŝas, aŭ povas tuŝi, nin ĉiuj, kaj oni ne plu spektas militon, sed eble povos sperti ĝin en la ĵusa estonto. Sed milito estas fia kaj en Eŭropo kaj ekster Eŭropo. Tiel romia poeto Terencio diris, *Nenio homa estas aliesa al mi*, tiel ni ĉiuj devus diri. Ĉar milito estas nenio pli ol kolektiva amasmurdado memlegitimita de egoismaj kialoj ĉiam. Pro tio milito estas perversa denaske, kaj tial ĝin devas eviti nin ĉiuj, pere de denonco, se oni ne povas fari ĝin per alia rimedo.

En ĉi tiu milito de Ukarinio subpreme de Rusio miloj da homoj jam mortis, kaj tio estas honto por homaro. Je 1898 la Hispana Imperio ĉesis ekzisti kiam estis milito kontraŭ Usono, kiu estis la aperanta imperio. Tiu nova imperio ne estis tiom kruela kiel la Brita Imperio, kaj kiam ĝi invadis

Germanion kaj Japanio, post kelkaj jaroj ĝi forlasis ties teritorion. Ili lasis tie manipulaciaj demokrataj sistemoj, kiujn oni apenaŭ povas nomi ilin demokrataj. Same okazis en Hispanio, kies demokration ili bapto-patris post kiam konvene la heredonto de la diktatoro mortis pere de atenco, kiun neniun terorisma bando povintus plenumi.

La Hispana Imperio, male, okupis preskaŭ ĉiun Amerikon kaj aliloken ankaŭ, sed dum sia regado okazis neniu milito en ties teritorio dum 300 jaroj. Tiam ne ekzistis demokratio, sed indiĝenoj estis aŭskultataj de vicreĝoj kaj registaraj institucioj, kaj estis libereco kaj laboro kun bonaj salajroj por ili. Tion ne sukcesis provizi la Usona Imperio malgraŭ tiuj kontrolitaj demokratioj. La sekureco de Eŭropo, bopatrigita de Usono ekde la fino de la Dua Mondmilito, ĉiam lamis, kaj ne vere estis ĝi libera el mondmilito inter Usono kaj Sovetunio *limigita al nia kontinento*. Feliĉe ni eskapis tiun destinton, sed lastatempe Prezidinto Donald' Trump' diris, ke *Eŭropo pagu sian propran sekurecon*, kaj anstataŭ sekvi tiun bonan konsilon, niaj registoj nur babi-

las kaj fanfaronas troe. Ili promesis la registaron de Ukrainio pri aferoj, kiujn ili ne povas plenumi, ĉar Eŭropo havas neniun armeon, kaj la rimedoj de tiuj armeoj de eŭropaj nacioj ne estas sufiĉe pretigita por kontraŭstari Rusion aŭ Ĉinion, kiuj ŝajne jam estas aliancitaj. Nur Usono restas kiel monda povo, sed ŝajnas, ke ties momento de gloro jam pasis, je la momento de kontraŭstaro kun la novaj imperioj.

Mi ne versos eĉ unu larmon pro la perdo de la imperieco de Usono, kaj eĉ se Ukrainio havas mian tutan simpatian, mi ne povas ne kompreni ke tio, kion Rusio provas fari nun estas simila al tio, kion Usono faris kontraŭ Meksiko je 19^a jarcento, ĉar post milito ili prenis la 60% de la teritorio de tiu ĉi lando. Eĉ estis akraj diskutoj ene de la Kongreso de Usono pri ĉu preni la tutan landon de Meksiko, ĉu ne, kaj finfine ili elektis ne preni la tuton, ĉar tio inkluzivus la homojn, kaj ili estis sufiĉe rasisma ne voli rilati al *tiuj mestizu-*

loj.

Se oni pikas iomete la historion de tiu parto de la



mon

do, oni trovas, ke la origino de Rusio estas en la *Rus' de Kiev'*, kiu je la tempo de Vladimir' la Granda, je la 9^a jarcento, kaj konkeris tiun teritorion, kiun oni vidas ne la apuda bildo. Laŭ jarcentoj ĝi estis detruita kaj rekonstruita, iĝante la plej vasta lando el la mondo de la tempo de caroj. Poste, dum la jaroj de Sovetunio, Rusio iĝis eĉ pli granda; kvankam post la lasta

jardeko de la pasinta jarcento ĝi estis dividitaj en 15 diversaj ŝtatoj: Estonio, Latvio, Litovio, Belorusio, Moldavio, ukrainio, Armenio, Azerbajĝano, Kartvelio, Kazaĥio, Kirgizio, Taĝkio, Turkmenio, Uzbekio kaj Rusio. Tiu lasta ankoraŭ estas la plej granda ŝtato el la tuta planedo.

Kiam oni parolas pri la **rusoj**, oni eble ne konscias pri tio, ke tiu vorto havas du sencoj: unue, la homoj de tia raso, rusa; due, la civitanoj de Rusio. Tio diversas la aferon el tiu usona, ĉar inter rusoj rasismo ne estas grava. Hodiaŭ rusoj invadis Ukrainion ŝajne pro du kialoj: ampleksigi la teritorion de Rusio koste al Ukrainio, kaj ankaŭ pro timo al starigo de NATAj atommisiloj proksime al landlimo kun Rusio. Je 2014 Rusio jam aneksis la duoninsulon Krimeon, kaj je 2022 la urbojn Donecko kaj Lugansko kaj ties teritorio ĉirkaŭ ili. Malgraŭ la aserto, ke post tio Rusio postulos pli da teritorio, ŝajnas, ke tio, kion Rusio volas estas nur eliron al Mar de Azov', eĉ se ili penas ekhavi la tutan duoninsulon de Krimeo.

Nun estas 50 jaroj de kiam la milito komencis, kaj estas multe da mortintoj en Ukrainio, kaj ankaŭ rusaj soldatoj.

Dekomence oni asertis, ke la kaŭzo de la milito estas la frenezeco de Prezidento Putin', sed poste venis novan informon pri tio, ke estas ekonomiaj faktoroj. Iama Supera Soveto Kruĉov' donacis la landopecon nun disputatan al Ukrainio, kaj ankaŭ Donbas' kaj Lugansk', eĉ se tiutempe la homoj tie estis plejparte rusaj, ne ukrainaj, kaj ili parolas la rusan lingvon, ne la ukrainan. Tio ne estas kialo por milito, kompreneble, nek por la teruraj muroj amasaj. Sed ŝajnas, ke ukraina armeo ankaŭ torturas kaj kripligas la rusajn soldatojn, kiujn ili kaptas.

Kaj dume Eŭropo, kaj Hispanio, flankas kun Ukrainio. Tio ja povas esti rigardata kiel politike korekta, sed ĉu tio utilas al Eŭropo? Nun ties norda parto dependas el la rusa gaso por energio, kaj sufiĉus al rusio ĉesi la sendado de gaso, por ke nordeŭropanoj iĝos malkomforte malvarmaj..

Ne, ne mondvilagaj tempoj milito ne estas solvo, kaj ĉiuj landoj devas peni por ke paco regos la tutan mondon. Ne nur eŭrope, kompreneble, sed tutmonde. Ĉesu la 85 militojn tra la tuta mondo, bonvole! Estu paco la sola imperio tra la mondo.

INmortigoj kaj pura racio

Sufiĉas tiom da sekta propagando —ĉu seksta? — kun la nombro da virinoj murditaj de siaj partneroj. Ŝajnas, ke kiam oni parolas kontraŭ la oficiala propagando —kiu multekostas al ni mujltajn eŭrojn— pri tiu ĉi reĝimo, kiun ni suferas, oni fariĝas kulpa pri volo mortigi virinojn, kaj diversajn aliajn stultaĵojn, kiujn ne savas malfacilaj provoj. moderna inkvizicio de homoj kiuj akuzas kaj postulas pruvon de senkulpeco.

Ĝis nun ĉi-jare, ili diris al mi hodiaŭ, jam estis 20 virinoj murditaj de siaj romantikaj partneroj. Por eviti tion, la nedifilebla Prezidanto Zapatero —aŭ unu el liaj ministroj, kies nomon mi ne volas memori— dekretis Leĝon pri Mistraktado, kiu suspendis la bazajn rajtojn de la homoj, same kiel okazis en la Mezepoko al la akuzitoj antaŭ la Sankta Inkvizicio. sen postuli ajnan pruvon.

Sed se ni vidas tiun problemon, ke ĝi estas reala, ke ĝi ekzistas kaj ne devus ekzisti, kaj ke analizi ĝiajn kaŭzojn kaj solvi la problemon ĉe ĝia origino ĉesos ekzisti, anstataŭ ĵeti

monon al homoj kiuj ne povas malhelpi ĝin, se ni vidu ĝin, mi diras, ene de la ĝenerala kunteksto de nia socio, ni trovas aliajn multe pli sangajn, al kiuj ni ignoras. Kiel la memmortigo.



Kial homoj memmortigas? Ni antaŭe sciis tion, sed statistikoj ne plu estas faritaj pri la kaŭzoj de memmortigo. Ni ĉiuj povus pensi pri pluraj, sed pripensema kaj serioza studo povus verŝi pli da lumo pri ĉi tiu temo...

De januaro ĝis hodiaŭ oni diras, ke 20 virinoj mortis pro siaj partneroj. Hieraŭ 10 homoj sinmortigis. Hodiaŭ aliaj 10 memmortigos, morgaŭ aliaj 10, ĉar ni havas mezume 10 memmortigojn ĉiutage, multaj el ili virinoj. Kio okazas? Ĉu ni estas frenezaj? De la 1-a de januaro ĝis nun pasis 136 tagoj, tio estas, 1360 homoj sinmortigis. Sed ni devas krii al la ĉielo ĉar ili mortigis 20, kaj ne 1 360...

Memmortigo estas la ĉefa kaŭzo de nenatura morto en nia lando. Kion oni faros por eviti ĝin?

Rakonto

Li ĵus legis libron el la 90-aj jaroj..., *Sub la ombro de Chopin*, de José María Gironella. Bona libro, se oni pardonas du-tri erarojn pri la pecoj luditaj de tiu juna pianisto*, Jacques Lamballe. Li metis la libron sur la tablon, kaj kiel ĉiam, kiam li ĵus legis libron, li kliniĝis malantaŭen en la flugilseĝon kaj komencis mediti pri tio, kion li legis.


Jes, ĝi estis bona rakonto, li diris al si, ne tiel pretendema kiel lia tetralogio pri la Hispana Enlanda Milito, sed sufiĉe distra, kun iom da sekso ĉi tie kaj tie, sed pritraktata tre delikate, kaj granda profundeco en homaj rilatoj.

Kaj subite li rimarkis, ke io mankas. Kiel Jacques, la protagonisto de la libro, Celedonjo ŝatas silenton. Nur tie estis tro multe da ĝi. Ĉar de pli ol dek jaroj li vivis akompanata de tinito.

Kie ĝi estis? Laŭ lia orelkuracisto, se ĝi ne estas forigitaj en la unua jaro, ĝi neniam estos forigita. *Kvankam oni neniam scias, novaj medikamentoj kaj traktadoj aperas ĉiutage...* Sed tio estis aferoj, kiujn oni rakontas al

Tinito

pacientoj ĉar ili volas aŭdi ilin. Oni diras ankaŭ al tiuj, kiuj havas kanceron, aidoson aŭ HPV



(Homa Papiloma Viruso). Eblas, ke jes, ke iam pri ĉi tiuj malsanoj resaniĝos oni. Sed tinito estas ridinda malsano, se ĝi estas, kiu ne kaŭzas morton, doloron, aŭ malhelpas onin vivi normale, kiel ĉiu alia homo. Estas malgranda ĝeno. Oni diras, ke Ŝuman' suferis pro tio, kaj ke li estis malespera, li eĉ saltis en la riveron por memmortigi kaj tiel

*Nome: La *Sesa simfonio* de Beethoven' ne estas peco por piano. Sendube li celis diri la *Fantazion Ĥoran*, kiu estas por orĥestro kaj ĥoro, kaj tamen piano havas ĉefan rolon. Ankaŭ la *Koncerto de Aranjuez* estas por gitaro, ne por piano. Pro tio, Jakvo Lamballe ne povus ludi ĝin per solo piano, kvankam ekzistas versiojn de la dua parto de tiu koncerto por piano sola. Libereco de verkisto havas limon en realo, ĉu ne?

ĉesi aŭdi ĝin. Sed, nu, Ŝuman estis iomete freneza, kaj li efektive finiĝis malbone, mortante baldaŭ post tio. Li estis enfermita en mensa malsanulejo, kaj krom identigi la tonon de lia tinito —*noto A sur skalo 3*, li diris—, li postulis ion, kion neniu povis doni al li tiam —aŭ nun, ŝajne—: ke tinito silentu.

Celedonio ne estis senespera, male al la granda genio de muziko. Plie: sciante, ke ne temas pri orelproblemo, ke liaj timpanoj estas bone, kaj ke ili ne suferos, se la malbenita tinito fariĝus pli laŭta kaj imperinenta, li donis al si la lukson analizi ilin. Ĉar ĝi ne estis nur unu. Li identigis du kontinuajn fajfadojn de malsama muzika tonalto. *Ho, duparta tinito*, li pensis. Sed ilin akompanis tria fajfado, kiu, male al tiuj du, estis pulsanta. Preninte lian pulson kaj atente aŭskultinte, li trovis, ke ĝi kongruas kun lia korbato. *Bone, li diris al si, nun mi eĉ aŭdas mian koron!* La malbona afero estus do, ke li ne aŭdis ĝin... Kaj tio estis la malbona afero.

Tio, ke leginte la libron de Gironella kaj kuŝiĝinte sur sia ŝatata oreseĝo por mediti la libron sola hejme, ĉar lia edzino eliris, li ne plu aŭdis iun el la tri tonoj, kiuj akompanis lin en la lastaj dek jaroj, ne povis esti

bona. Li provis malfermi la okulojn, sed li ne povis. Mi celas diri, ke jes, li havis la volon malfermi ilin, kaj li ja malfermis ilin, aŭ tiel li pensis, ĉar li neniam regis la mekanikon de sia korpo. Sed li rigardis siajn manojn, kaj li nenion vidis: ĉio estis malluma. La mallumo estis absoluta. Estis nenio tie, estis neniu, nenio estis aŭdata, nenio estis vidita. Ĝi provis moviĝi, kaj oni dirus, ke ĝi moviĝas, sed li ne sciis kien, nek kiom rapide. Li komprenis, ke li nenie estas. Ĉu li estus atinginta nirvanon?

Ĉar li estis en meditada grupo, kiu kunvenis marde, ĉiu hejme, per komputila programo. Kaj la lastan fojon tie oni parolis pri nirvano. Tiu stato de absoluta feliĉo, en kiu nenio bezonas, en kiu oni havas ĉion, ĉar oni havas nenion, eĉ ne la bezonon havi ion. Li havas nur sin mem, kaj eble nek tion.

Kaj la stranga afero estas, ke Celedonjo ne timis. Ĉu li jam estas mortinta? Li ne pensis tiel, sed li ankaŭ ne rimarkis sian spiradon. Kaj kie estas la fama tunelo menciita de la preskaŭ mortintoj, kiun oni vidas ĉe la fino de lia vivo? Ĉar li nenion vidas. Nur Jakvon Lamballe, ties gepatrojn, ties amantinojn, nu, aŭ pli-malpli fortajn amikinojn, ties muzikistojn, ties

amikojn, ties manaĝeron, la nedifineblan Pierre Marcel. Sed eĉ ili ĉiuj estas nur malforta memoro. Lia tuta vivo estis tia. Ĉu li mortis dum legado? Sed ne, li atingis la finon de la libro. Ĉu lia vivo estis finita antaŭ la fino de la libro?

Li memoris, ke li fermis ĝin kaj deponis ĝin sur la tablon en sia salono. Kaj kliniĝis sur sian plej ŝatatan brakseĝon. Sed li nenion plu aŭdas. Li nenion vidas. Li volas pensi pri nenio ajn.

Kaj li aŭdas nenion. Nek neniun el la tri tinitoj, kiuj fidele akompanis lin dum la lasta daŭro de lia vivo. Ĉu li jam resaniĝis pri ili aŭ pri vivo?

«Vi ja dormas», li aŭdis sian edzinon diri al li.

Li malfermis siajn okulojn, kaj jen ili estis: lia edzino, kiu ĵus revenis hejmen, kaj lia tinito. Ili tri.

«Mi havis belan sonĝon, edzino. La plej bela el mia vivo».

«Ho, ĉu jes? Kaj kion vi sonĝis?»

«Nu, mi sonĝis...»

Diablo, la vero estas, ke mi nenion sonĝis, pensis li. Tio estis la beleco de lia sonĝo: nenion sonĝinte. Sed konscii kiel li neniam faris en sia tuta vivo. Tio estis la beleco de lia sonĝo!

Io diris al li, ke kiam alvenos la momento de la vero, li alfrontos ĝin sen timo aŭ malsekureco. Kaj ke la tinito restas ĉi tie.



José María Gironella

Kial komencis la milito de Rusio kontraŭ Ukrainio?

de Andreo Jankovskij

Nuna Rusio estas absolute diktatoreca lando, kiu malamas eŭropajn valorojn, kiel regulan ŝanĝon de estraro, referendumojn, homajn rajtojn, protestoj ktp. Rusia caro opinias, ke ĉi tiuj valoroj estas malbonaj kaj ruinigas lian potencon.



Do, kiam Moldavio, Ukrainio kaj Kartvelio komencis fari reformojn kaj iri for' de diktatoraj reĝimoj, tiom pli komencis doni malbonan ekzemplon por loĝantoj de Rusio – Putin decidis komenci militon kontraŭ ĉi tri landoj kaj kontraŭ institucioj de libera mondo mondscale. Putin montras al ni ĉiuj, ke Unuiĝintaj Nacioj nenion povas fari, ĉar Li havas veto-raĵton, ke NATO ne povus vere protekti baltajn landojn, ĉar li havas nukleajn armilojn, ke Putinaj leĝoj estas pli altaj ol mondinstitucioj. Do putinistoj volas malaltigi mond-vivon ĝis nivelo de nuna Rusio – ĝis ĝangalo, kie la plej fortaj kaj ruzaj diktatoroj ruinigos vivon de aliaj homoj sen esti punataj.

Kiel eblas helpi al Ukrainio?

1. Helpi al ukraina armeo – arma venko la plej forte batos Putinon kaj li falos.
2. Regule kreskigi sankciojn kontraŭ Rusio – pli longa tendenco, sed dum kelkaj monatoj reĝimo de Putin malvenkos.
3. Helpi al rifuĝintoj el Ukrainio – ne pensante pri sekureco de siaj familioj, ukrainaj soldatoj fariĝos dufoje pli fortaj

Kion ni ĉiuj povas fari en estonteco?

1. Ĉe la Unuiĝintaj Nacioj oni povas nuligi veto-raĵton de landoj kun nukleaj armiloj. Aldone ni povas organizi tutmondan referendumon kaj komenci epokon de sankcioj kontraŭ tiaj landoj. Ja ili povas ajnmomente komenci ĉantaĝi homaron per nuklea milito. Ukrainio propravole nuligis siajn nukleajn armilojn kaj eĉ nun, dum kruela milito, ukrainoj ne dubas, ke ili faris ĝuste.
2. Se iu diktatoro nuligis elektojn, aŭ konstitucion, aŭ jam regas dum pli ol 10 jarojn – mondinstitucioj povas ne atendi absolutan uzurpadon kaj plenan nuligon de homaj rajtoj. Ili povas puni tiujn reĝimojn tuj kaj la sankcioj devas kreski.
3. Se iu socio komencas batali por ebleco vivi kun elektoj, referendumoj, transiri al parlamenta sistemo, krei sendependan juĝsistemon ktp. - mondinstitucioj tuj

subtenu ilin per diversaj rimedoj.
4. En universitatoj oni instruu, kiel pensi pri sekvaj 1000 jaroj, tia pensmaniero evitos multajn danĝerojn, kiujn ni povos

renkonti en estonto.

Verkis *Andreo Jankovskij kaj Volodimir Hurtovenko el Kijivo, ĉefurbo de Ukrainio.*

Ke Dio gardu la Reĝon!

Homa epizodo dum la Hispana Intercivitana Milito

Miaj kunuloj estas for. Mi ne scias kiom longe mi povas daŭri en ĉi tiu pozicio. Mi havas sufiĉe da municio por teni tiujn antaŭulojn ĉe golfeto, sed ili estas multaj, kaj mi estas nur unu.

Mi estas ĉe la Gandesa fronto. Mi estis trafita en la ŝultro komence de la batalo. Mi vekiĝis kun febro kaj frostotremoj. Apud mi estas multe da mortintaj kamaradoj, ankoraŭ kun la fusilo en la manoj. Estas pro ili ke mi povis anstataŭigi la kuglojn kiujn mi uzas. Anstataŭ ŝargi mian fusilon, mi iras al kie ili estas kaj uzas la ilian.

Kial neniu alia vivas? Kiam mi vekiĝis, mi manĝis ion, mi trinkis, kaj kiam mi vidis la aliajn alproksimiĝi, mi aktivigis la maŝinpafilon kaj *ekspedis* kelkajn malamikojn. Ili elkuris kaj eniris sian tranĉeon. Ili pafis al mi, sed ili ne sciis de kie venas miaj pafoj. Mi rampis en la tranĉeon, kaj mi pafis el diversaj lokoj, do mi preskaŭ

neniam maltrafis, kaj anstataŭe ili ne batis min.

«Kapitano, temas pri nur unu!», mi aŭdis ilin diri.

Mi respondis per pafo al la gorgo de aliloke. La aliaj *kombis* la areon per abunda pafado, kiun mi ne povis respondi, pro evidentaj kialoj. Mi kaŝis min ĉe la fundo de la tranĉeo, kaj rampis al alia pozicio, pli for. Kiam mi vidis, ke ili fine eliris, rampante sed sur malferma tero, mi sendis tri alimonden antaŭ ol ili revenis al siaj lokoj.

Estas amuze, kiom da kontrolo oni povas havi el tranĉeo, se oni havas bonan paflertecon... Mi ĉiam sukcesas trafi ilin flanke, kaj ili neniam trafas min ĉar mi moviĝas kiel serpento. Murdinta-serpento.

Antaŭ kelkaj tagoj mi trovis la mikrofonon, per kiu nia flanko parolis al la alia trans la strato per la laŭtparoliloj, kaj mi komencis kanti belan kanton:

*Se vi volas skribi al mi, vi
scias mian kieon...*

*Sur la Gandesa fronto, la
unua linio de fajro...*

Tiuj bastardoj repafis, elprenante du el la tri laŭtparoliloj en la tranĉeo. Porkoj.

Mi ne scias kiom longe mi povas daŭri ĉi tie. Sed vivu la Respubliko!

Mi skribas por registri mian lukton por la idealoj de libereco kaj demokratio. Mi ne scias, ĉu iu legos ĉi tiujn paperojn, aŭ bruligos ilin, aŭ viŝos sian pugon per ili, sed dum mi skribas per ĉi tiu kruda krajono mi trovas, ke mi kuraĝigas min, kaj tio sufiĉas.

Foje mi diras al mi, ke mi estas idioto, ke mi povus esti en mia urbo, en Whitby, kun miaj geamikoj, kun mia laboro, kiu permesos al mi edziĝi kaj vivi kun Vivien, mia fianĉino. Sed mi aliĝis al la 15-a Internacia Brigado por batali por miaj ideoj, por libereco, egaleco, frateco. Kiam ni venis per la trajno, mi renkontis certan Eric Blair, kiu vivis en Parizo, kvankam li estas anglo kiel mi. Li diris al mi, ke li ŝatas verki, ĉar estas bone legi post longa tempo tion, kion oni skribis antaŭe kaj vidi kiel ĝi ŝanĝis sian vivon. Mi faras ĉi tion tiucele, ankaŭ. Eble li estos unu el tiuj, kiuj legos ĉi tiun taglibron de mia sperto ĉi-fronte.

Kion faras Vivien nun? Ŝi certe edziniĝis al iu, eble ŝi havas infanon, la infanon, kiu povus esti mia... Sed, nu, la libereco donos al ni neniu. Ni devas defendi ĝin per pura pafado, se necese, kiel ĉi tie, en ĉi tiu lando. Demokratiaj landoj estas ĉirkaŭitaj de totalismo: en Italio estas la faŝistoj, en Rusio la komunistoj, en Germanujo la naziistoj... Oni diras, ke tiu ĉi Hispana Milito estas la testprovo por la venonta mondmilito. Se jes, oni devas venki ĝin. Kvankam ŝajnas, ke mi estas sola...

Ĉar nun mi estas sola, sed kiam mi alvenis ĉi tien, estis multaj el ni. Antaŭ iom da tempo ili ĵetis bombon, kien mi pafis antaŭ kelkaj minutoj. Feliĉe mi moviĝis iom pli ol kutime, ĉar mi serĉis manĝaĵon kaj mi ne trovis ĝin antaŭ ol mi veturis tricent metrojn, en la poŝo de unu el la falintaj kamaradoj mi trovis ĉokoladan trinkaĵon. La kompanindulo havis frakasitan vizaĝon. Faŝismaj bastardoj. Domaĝe, ke ne ekzistas Infero, ĉar se ĝi ekzistus, ĉiuj tiuj hundidoj irus tien kapantaŭe, gvidataj de Frankito, tiu afrika merdulo.

Kiam ni alvenis, la kolonelo diris al ni, ke ni devas rezisti kiel ajn, por ke la aliaj kamaradoj el aliaj brigadoj povu refali al la alia flanko de Ebro kaj savi la valoran militmaterialon. Kaj poste estas la

civiluloj. Ili devas esti evakuotaj al Francio kiel eble plej baldaŭ, por ke la faŝisma hordo ne mortopafos ilin ĉiujn.

Tiuj, kiujn mi ne vidis inter la mortintoj, estas la politikaj komisaraj, kiuj donas al ni la babiladon kiam la kamaradoj el Anglio, Francio kaj Italio alvenis al la Brigado. Kie ili estas?

Mi estas ankoraŭ ĉagrenita. Tiom da morto ĉirkaŭ mi ne donas al mi la forton por pluiri. Mi pensas, ke strategia retiriĝo estas en ordo. Sed..., se mi moviĝos de ĉi tie, ili vidos, ke mi estas unu, kaj ili ĉasos min kiel kuniklon. La tranĉeo estas mia viva asekuro. Ĝis ili mortigos min, kompreneble. Ili estas multaj mi estas nur unu. Ne, mi ne volas foriri de ĉi tie.

Sed kion mi volas? Venki la militon sole? Eble ili sendos plifortigojn... Antaŭ iom da tempo mi vidis la radion en la dorsosako de tiu, kiu ĝin portas. Oni pafmortigis lin en la kapon, la kompatindulon. Jes, ĝi funkciis. Mi vokis, sed neniu respondis. Kie estas miaj kamaradoj? Ĉu ili ĉiuj jam iris al Francio?

Ĉi tiu malvarma mateno de la 28-a de aprilo 1938,

mi vekigis maltrankvila. Mi vidis super la tranĉeo fusilon, kiu moviĝas. Malamiko estis ŝtelironta enen! Mi tiris la barelon malsupren, kaj sendis ĝin ĉielen per unu pafado de la pistolo de la leŭtenanto, kiun mi prenis de lia kadavro antaŭ tagoj. Mi neniam mortigis iun tiel proksiman. Tiu preskaŭ infano surprizite rigardis min antaŭ ol lia cerbo disverŝiĝis ĉirkaŭ ni. Kompatinda. Ŝokis min kompreni, ke povis esti mia cerbo ĉirkaŭ ni...

Tio igis min demandi al mi pli da demandoj. La plej terura estas: **Kion diable mi faras ĉi tie?** Kiel mi povus klarigi tion al miaj infanoj aŭ miaj nepoj? Mi mortigis homojn, proksime, kiel ĉi tiun infanon ĉi-matene. En la nomo de libereco, egaleco, frateco. Ĉu vere? Ĉu oni mortigas homon pro frata amo? Kiel ironia! Nun li mortis, kaj mi ne. Ĉu tio estas egaleco?

Mi havas tre limigitan liberecon, ĉar mi ne plu povas eliri el ĉi tiu tranĉeo kaj resti viva. Sed li ne plu havas.

Ne, mi ne devas resti ĉi tie. Ĉi tio ne estas vivo. Neniu venos serĉi min. Nek helpi min. Mi agas stulte kaj vane, kiel oni diras ĉi



tie, tio estas, mi estas stulta je profito alies. Mi retenas multajn soldatojn de la alia flanko, sed mi ne daŭros longe, se mi daŭrigos ĉi tion. Ili estas same timigitaj kiel mi. Mi pli bone iru.

Tiu ĉi longa letero estu la atesto, ke mi, Harold MacFerris, estis ĉi tie, en la Gandesa Fronto, provinco Taragono, Hispanio, defendante Liberecon, Egalecon kaj Fratecon, kun majuskloj, koste de libereco, egaleco kaj la frateco de tiuj, kiuj batalas kontraŭ mi kelkajn metron for de mi, kies individuajn liberecojn miaj kugloj ne respektis, same kiel iliaj forprenas de mi tiun mian. Mi ne konsideras ilin miaj egaluloj, nek amas ilin kiel fratojn, ĉar ili estas faŝismaj porkoj. Tial ili ne estas la samaj kiel mi, kiu defendas miajn respublikanajn ideojn. En mia lando ne ekzistas respubliko ekde la 17-a jarcento, bedaŭrinde, sed dum mi loĝis tie mi sentis min pli libera ol ĉi tie.

Tial mi pensas foriri. Sed ĉu mi povos fari ĝin? Mi kredas, ke tiuj aĉuloj trans la intertranĉo ne pardonos min pro tio, ke ili prenis tiom da ili for. Certe ili pafmortigos min en ia proceduro, eĉ ne militkortumo.

Nu, mi ja sukcesis, mi eskapis laŭ la deklivo sen esti vidata. Poste mi saltis en la riveron kaj naĝis al la alia flanko. Kaj promenante, promenante, post kelkaj tagoj mi alvenis en Francujon. Tie la francoj donis al mi trajnbileton al Londono.

Nun mi estas hejme kun mia familio. Vivien mortis en la mondmilito. Oni vokis min servi en la Hejma Gvardio, ĉar mi revenis malsana de la Hispana Milito. Mi patrolis la marbordon dum kvin jaroj. Nun mi estas rompita ludilo, kiu ne ĉesos paroli pri la milito... Dio, ĉu vi iam pardonos min pro tiom da homoj, kiujn mi mortigis? Mi legis du librojn de Eric, kiu subskribas kiel George Orwell, **1984** kaj **Omaĝo al Katalunio**, kaj nun mi komprenas, ke en la milito oni primokis nin. Lin kaj min, kaj tiujn multajn...

Dio savu la Reĝon, dum multaj jaroj.

Noto de la redaktoro.- La Reĝo de Britio, la patrujo de Harold, Georgo la 6^a, mortis 14 jarojn post kiam tiu eta milita taglibro estis komencita. Lia filino, aliflanke, Isabel 2^a, ŝajnas obei la dezirojn de Harold, ĉar ŝi estas en oficejo dum pli ol 70 jaroj.

Miaj verkoj

La patro de sia amantino


De la jaro 2016 mi publikigas per mia retejo tutan libron trilingve, por senpaga legado en Esperanto kaj la angla kaj la hispana lingvojt, ĝis la fino de la koncerna jaro, kaj la 31^{an} de decembro mi anstataŭas ĝin per la venonta libro, sed tamen la esperanta versio restas tie por senkondiĉa legado. Ĉifoje la libro konsistas el 15 fabeloj, kiujn mi esperas, ke plaĉos al leganto. Sekvantlinie mi inkluzivas la unuan fabelon. Memoru, ke oni ĉiam trovos ĝin ĉe

<http://www.obracompleta.com/eo/monato.html>

Filomino ne havis facilan vivon. Orfo ekde frua aĝo, ŝi estis edukita fare de sia avino, Fabiolino, la patrino de ŝia patro. Li mortis en trafik-akcidento kiam ŝi estis dekjara, dum ŝia patrino mortintis en akuŝo kiam ŝi estis naskita. Lia avino devis roli kiel patro kaj patrino, sed ŝi estis antaŭ ĉio firma, malgraŭ esti ĉarma maljunulino.

La kompatinda sinjorino foriris kun sia filo kiam ŝi jam estis 70-jaraĝa, kiam Filomino jam estis 23 kaj finis siajn studojn en la universitato. Ŝi devis prokrasti siajn aprobojn ĝis septembro, ĉar la morto de la bona maljuna Fabiolino rompis ŝian vivon, kaj ŝian koron. Kion ŝi farus nun, sen sia amata avino? Ŝi malĝojis pli ol unu monaton, sen eliri el la domo, plorante. Ĝis ŝi rememoris la vortojn de Doña Fabiolino:

Kie ajn vi estas, mi estos. Studu, finu vian diplomon, laboru kaj estu feliĉa, mia knabino. Se vi sukcesos en la vivo, mi sukcesos kun vi. Se vi ploros, mi ploros kun vi.



Oni povas trovi la libron en amazon kaj en la hispana kaj en la angla, kontraŭ €2'88, kaj senpage en Esperanto ĉe mia retejo.

Ŝia avino instruis al ŝi sian vivofilozofion, ŝi instruis al ŝi kiel vivi. Post 30-jara geedzeco ŝi estis vidvino baldaŭ antaŭ la naskiĝo de Filomino, al kies edukado ŝi dediĉis sin korpe kaj anime, precipe ekde la morto de sia filo, ĉar ambaŭ estis la solaj vivantaj parencoj, kiujn havis la bona sinjorino: la filo kaj la nepino.

En septembro Filomino finis siajn studojn, kaj la sekvan jaron ŝi faris la ekzamenojn por fariĝi impostinspektoro. Ŝia laboro baziĝis sur nombroj, pri kiuj ŝi pasiĝis. Kaj tiam ŝi renkontis lin.

Li estis iom maldiligenta kaj tre senscia junulo. El tiaj, kiaj bezonas helpon. Ŝi sentis sin potenca adoptante lin, kvankam li estis sufiĉe pli maljuna ol ŝi. Ili geedziĝis jaron poste, kaj la alian postan jaron ili divorcis. Li estis maldiligenta kaj senutila el tiuj uloj, kiuj vivas je koste de siaj gepatroj ĝis ili povas vivi de sia edzino. Ŝi provis sian bonŝancon ĉe geedziĝo dufoje pli, kaj ambaŭfoje rezultis same malbone. Kaj je 35 jaroj ŝi estis eksedziĝinta la tria kaj lasta fojo. Feliĉe ŝi ne havis infanojn. La unua el tiuj edzoj ne volis, la dua neniam pripensis tion, kaj kvankam la tria ja volis havi ilin, ŝi ne plu volis. Tio estis unu el la kialoj de la eksedziĝo. Sed ŝi estis profunde senluziigita pri amo kaj la rilato

de la paro. Ŝi ne plu batalus en la taŭrejoj de amo, aŭ almenaŭ tion ŝi tiam decidis.

Dek kvin jarojn poste ŝi jam havis bonan bandon da amikinoj, ĉiuj fraŭlaj aŭ eksedziĝintaj sen deziro kompliki sian vivon kun viroj. Ŝi provis knabinojn, sed tio naŭzis ŝin eĉ pli ol elteni viron de ajna klaso.

«Sinjorino, ĉu vi povas diri al mi, kie estas la oficejo de sinjoro Eskribano?»

«Mi estas sinjoro Eskribano, sinjoro. Filomino Eskribano. Kion mi povas fari por vi?»

Tiu knabo estis tre perdita. Li estis tre juna, apenaŭ dudekjara, se tiom multe, kaj line bone komprenis pri sia enspezimposto. Iu sendis lin vidi Federikon Escrivá, F. Escrivá, oficisto kiu helpis homojn fari siajn enspezimpostdeklarojn. Sed li eraris la nomon kaj la oficejon. Ŝi amuziĝis, kaj ŝi mem faris tion por li. Ŝi estis altirita al li de la unua momento. Ĉu amfajrero? Jes, eble tio estis. Aŭ amsago... kiu scias? Sed ne okazis al li la sama afero, kvankam li tre ŝatis ŝin, evidente.

Lia deklaro enhavis lian adreson kaj telefonnumeron, same kiel lian retpoŝton. Tial ŝi telefonis al li du semajnojn poste.

«Saluton», ŝi diris, «mi devas

paroli kun vi».

«Ho jes, sinjorino Filomino. Ĉu ajna problemo kun mia deklaro?» Ĝi estis fakte la deklaro de liaj gepatroj, ĉar li ankoraŭ ne emancipiĝis.

«Ho ne, ne maltrankviliĝu. Sed mi devas paroli kun vi».

Ili renkontiĝis en hotela kafejo. Ĝi ne estis iu ajn hotelo. Ĝi havis kvin stelojn.

«Mi ŝatas vin... Ĉu vi ŝatas min?»

Ŝi ne povis subpremi senton de kulpo kaj malkomforto en la momento mem de dirado de tiuj vortoj. Kion ŝi farus kun ĉi tiu infano, kiu povus esti ŝia filo?

«Tre multe, S-ino Filomino», li tamen diris.

Tion ŝi ne esperis. Eble ŝi esperis reason de miro, teruro, skandalo... Aŭ almenaŭ, ke tiu knabo nervoziĝos multe. Sed ne, kun sia tuta memfido li ĵus diris multon. Ke li multe ŝatas ŝin. Sed ŝi estis pli ol duoble de lia aĝo. Ŝi estis 150% pli aĝa ol li.

«Ĉu vi vere ŝatas min?» ŝi demandis kvazaŭ ŝi estus dekkvinjara.

«Jes».

«Ĉu vi amorus kun mi?» Ŝi ekpafis rekte.

«Estus honoro. Ĉu ci seriozas?»
Konsciante pri la cidiraĵo, ŝi ĝuis la momenton.

«Do ni iru. Prenu la ŝlosilon. Mi iros post iom».

Ŝi donis al li la ŝlosilon de ĉambro en tiu hotelo kaŝe. Li rigardis ĝin: 405.

Kiam ŝi alvenis, li rigardas tra la fenestro.

«Kion vi rigardas?»

«Tion, kiom malgrandaj ni estas. Ĉiuj tiuj sube revas, laboras kun peno pri aferoj, ili deziras esti feliĉaj. Sed ili estas tro okupataj por sin halti antaŭ tiuj malgrandaj aferoj, kiuj feliĉigus ilin»

«Filozofo. Interese. Kaj ĉu vi aĝas nur dudekjare?»

«Tion diras mia identigilo. Kaj ci?»

«Mi aĝas kvindeke».

«Ho, kiu atingos tion!»

«Kio?» Ĉi tiu viro ne estas de ĉi tiu mondo, ŝi pensis.

«Nu, vi jam vivis kvindek jarojn, kaj ne mi scias, ĉu mi atingos tiun aĝon. Kaj verŝajne, mi ne malprofitis ilin. Ci aspektas pli juna kaj bela».

«Ĉu juna? Ĉu bela? Ĉu vi preferas aĝajn virinojn?»

«Ne».

«Sekve?»

«Sekve mi ŝatas cin»

Jes, tiu homo devas esti marsano. Aŭ maljuna kun korpo de infano. Ŝi ne povis kompreni lin. Ŝi ne vidis tien, kien li iras. Male al ŝi, kiun oni povas vidi ŝin veni de for. Pro tio ŝi demandadis lin multe, kaj poste respondis al ĉiuj liaj demandoj.

Dum horoj ili parolis senhalte. Ili rakontis unu la alian siajn tutajn vivojn.

Du ili parolis, ŝi senvestiĝis, kaj poste senvestigis lin, sen ŝajne rimarki tion, ĉar li estis tiel engaĝita en tio, kion ili diras unu la alian, kaj li ne volis interrompi ŝin per io tiel vulgara kiel Kial vi senvestiĝas?, aŭ Kial vi senvestigas min?

Ŝi kuŝiĝis kaj igis lin kuŝi apud ŝi, sed li ne kuraĝis interrompi la dialogon. Do la tagiĝo kaptis ilin nuda en la lito, tenante la manojn kaj farante nenion alian tutnokte.

«Ho, mi devas iri labori», ŝi diris. «kaj ĉu vi ne laboras?» ŝi diris duondorme.

«Ne, Filomino. Ankoraŭ ne. Mi estas tro juna por tio».

«Kaj kion vi faras?»

«Mi studas Historion. Se vi devas iri», li diris al ŝi dum ŝi finis sin vesti

«ni povas vidi unu la alian poste, se vi volas».

La tutan tagon ŝi pensis pri li. Kiel juna viro kiel li povus interesiĝi pri virino tiel maljuna kiel ŝi?

Vespere, je la oka, li atendis ŝin kie ili interkonsentis.

«Mi kredis, ke vi ne venos».

«Kial?»

«Mi ne scias... Ĉu vi ne vidas min kiel vian patrinon?»

«Ne, ci tute ne similas al ŝi»

«Kian tagon via?»

«Bone. Mi iris al universitato, al klaso. Poste mi iris hejmen manĝi, kaj poste mi revenis en universitaton studi en biblioteko faka. Kaj nun mi estas kun vi, finfine».

«Ĉu finfine?»

«Jen la plej bona momento je tago mia».

Ŝi ridetis. El kie venas tiu viro? Li devintus naskiĝi tridek jarojn pli frue..., kaj ŝi trovi lin anstataŭ Antonjon, ŝia unua edzo. Ĉar tiu ĉi diris la plej belajn aferojn, kiujn ŝi aŭdis viron diri al virino. Kaj aldone li parolas al ŝi kvazaŭ li konas ŝin de la tuta vivo Kiel tio eblas?

«Nu, kion ni faros?»

«Ĉu ci ŝatus vidi filmon?»

«Estus bone. Ĉu vi pensis pri kiu?»

«Oni rekomendis al mi la filmon **La Sesa Senco**».

«Ĝi sonas al mi. Pri kio temas?»

«Pri infano, kiu havas problemojn. Mi ne scias plu».

«Ĉu ĝi estas bona?»

«Tion oni diris al mi».

«Nu, ĝi povas esti distra».

Ŝi sentis sin rekonita en la soleco de tiu knabeto, kvankam ŝi neniam estus imaginta tian surprizan finon...

«Kion vi plej ŝatis pri la filmo?»

«La knabo havis nekredeblan sentemon... Kaj la finon, kiun mi ne atendis».

Lia rideto havis tuŝon de cinikismo.

«Ĉu vi atendis tion?»

«Nu, duonvoje de la filmo mi jam sentis ion».

«Kiam?»

«Kiam mi vidis, ke lia edzino ne atentis al li la plej malgrandan atenton».

«Ho, jes, kompreneble... Ĉu vi jam vidis la filmon?»

«Ne. Sed, nu, mi estas tre suspektema, sciu».

«Ĉu tial vi renkontas pli maljunan virinon?»

Tion li ne atendis.

«Nu, mi ne scias... Povas esti». Li reakiris konfidon en si mem: «jes, tio ja povus esti. Mi malfidas junajn virinojn. Miaaĝaj knabinoj havas kapojn plenajn de stultaĵoj, kaj ilia babilado estas supraĵa kaj enuiga. Ili pensas nur pri sensencaĵo kaj geedziĝo.

«Kaj vi, ĉu vi pensas, ke pli maljuna virino donas al vi sekson sen devoj?»

«La seksa afero estas neĉefa. Pri la komplikaĵoj, vi maljunaj prezentas malpli da ili, jes, sed vi estas pli kompleksaj ol la junaj virinoj. Kaj mi ŝatas tion».

«Mi diris devojn, ne komplikaĵojn».

«Nu, ci pravas. La pli maljunaj ne trudas devojn, vere. Sed mi ne pensis pri tio. Ci vidas, mi estas tre baza. Pli ol mi pensis». Li ridetis.

«Ĉu vi edzinigos min?»

Tiun demandon li ja atendis. Longtempe.

«Eble. Kiam ni pli bone konas unu la alian... Edziĝi estas tre serioza afero».

«Kaj se mi dirus al vi, ke ĝis ni geedziĝos ne estos sekso?»

«Mi atendus. Aŭ ĉu ci diras tion al mi? Ĉu vi proponas al mi?»

«Ne, stultulo, kompreneble ne. Ni konas unu la alian de kelkaj tagoj. Mi jam trifoje edziĝis. Kun du senhontuloj kaj batanto».

«Mi neniam mistraktus vin, mi tro respektas vin por tio. Sed mi devus vivi je via kosto, ĉar mi estas ankoraŭ studento sen propraj rimedoj. Nun mi vivas koste de miaj gepatroj, sed tion pli bone vidas la socio ol vivi je via kosto» li diris palpebrumante.

«Por la rekordo, ĝi estis teoria demando. Mi ne proponas al vi».

«Despli bone».

«Ĉu despli bone?»

Li ridetis sed diris nenion. Li lasus ŝin preni ĝin.

Sed ŝi ŝanĝis la konversacion:

«Ĉu vi permesus al mi inviti vin al vespermanĝo?»

«Mi ne scias. Mi sentus malbone. Mi ĉiam invitis la virinojn kun kiuj mi renkontis. Ne por vespermanĝo, kompreneble, mi ne havas tiom da mono».

«Mi emas manĝi ekstere. Fakte mi faros tion. Kaj se vi ne estas tiel masklisma kiel mi pensas, vi venos kun mi kaj ne ĝenos al vi, ke mi vin invitas».

«Bone, bone..., kie?»

«En la restoracio Leonardo, tiu trans la strato».

«Tio estas unu el la multekostaj. Mi ne povus inviti cin eĉ se mi laborus».

«Sensencaĵo. Vi invitis min al la kino. Mi invitas vin al vespermanĝo».

Dum la vespermanĝo ŝi vidis, ke ŝi sentas sin komforte kun tiu knabo. Kaj ŝajnis al ŝi, ke ankaŭ li bonege amuziĝas.

Ŝi ne estis koketa virino, kaj krom ŝia privata vivo estis nur ŝia. Tial la nura afero, kiun ŝiaj amikinoj sciis, estis, ke ŝi renkontas kun iu, kio multe surprizis ilin, ĉar ŝi, same kiel ŝiaj amikinoj, estis jam en aĝo, kiam estas malfacile trovi partneron, ĉar viroj de ŝia aĝo preferas kaj trovas pli junajn virinojn, kaj tiuj, kiuj estas pli aĝaj ol ili, ne plu estas por tiuj taskoj, aŭ vivas agrablan maljunecon kun siaj edzinoj aŭ filinoj.

Dum la vespermanĝo ŝi pripensis ĉiujn ĉi aferojn, kaj paginte la fakturon, ŝi diris al li ion, kion tiu junulo tute ne atendis.

«Rigardu...» Ŝi montris al ŝi ŝlosilon kun la numero 405 de la hotelo de la alia fojo, kiu hazarde estis kelkcent metroj for. «Mi iras al nia ĉambro. Mi baniĝos kaj poste mi

atendos vin en la lito, nuda. Prenu vian tempon. Ĝis morgaŭ je la oka mi havas nenion por fari. Mi atendos vin la tutan nokton, tamen», ŝi ridetis, «vi devas doni al mi almenaŭ duonhoron, por ke mi pretiĝu por vi».

Li rigardis ŝin surprizite.

«Kie estas la afero, ke ĝis ni geedziĝos ne estos sekso?»

«Tio estis teoria demando, mi jam diris al vi. Mi neniam edziniĝos. Trifoje sufiĉis. Kaj mi konsilas al vi ankaŭ ne edziĝi. Oni neniam scias kun kiu oni geedziĝas ĝis kiam jam estas tro malfrue».

Li rigardis ŝin kun plezuro. Li prenis ŝian manon, milde kisis ĝin, poste prenis la ŝlosilon, zorge rigardadis ĝin kaj remetis ĝin en ŝian manon.

«La 405», li diris, «mi lasos al vi la dubon, Filomino. Mi ja kredas je edziĝo, kaj kvankam mi ne postulas ĉastecon ĝis la geedziĝnokto, mi opinias, ke ĝi ne estas malbona ideo».

«Mi komprenas».

«La alian tagon plaĉis al mi, ke ni parolis la tutan nokton kaj ke ni ne seksumis eĉ kiam ni ambaŭ estis nudaj».

«Ankaŭ mi ŝatis tion. Vi estis ekscitita, sed vi regis vin».

Li ridetis sed diris nenion.

«Nu», ŝi finis, «mi do foriras kun la dubo».

Ŝi leviĝis, lasante lin helpi ŝin enmeti sian mantelon. Tiaj sinjoroj ne plu estas, ŝi diris al si, kaj malpli en lia aĝo.

Ŝi kisis lin sur ambaŭ vangoj, kaj malrapide forlasis la restoracion. Li restis trinkante sian kafon.

Kelkajn minutojn poste ŝi estis en la hotelo. Ŝi supreniris al la kvara etaĝo, iris en sian ĉambron kaj senvestiĝis. Ŝi lasis siajn vestaĵojn sur la lito, poste prenis bobelbanon. Ŝi ripozis dudek minutojn, pensante pri tio, kion li faras. Lulilrabisto, ŝi diris al si. Jes, kio do? Mi ne devigas lin fari ion ajn. Se li ne venos, do amikoj. Se li venos, mirinda. Ŝi rigardis al la fenestro, kiu rigardis la banĉambron. Ne ellitiĝinte, ŝi restis tiel longe. Tiam ŝi fermis la okulojn. Se li venos kaj ni faras nenion, bonege. Se ni parolas, kiel la alian tagon, pli bone. Kaj se ni havas sekson... nu, mi ne scias. Mi esperas, ke tio ne difektos nian amikecon.

Subite ŝi rigardis la horloĝon. Pasis preskaŭ unu horo. Li ne venis, ĉar la pordo estis fermita kaj neniu vokis.

Li ne venos, ŝi diris al si. Nu, eble ĝi estas por la plej bono. Ŝi estis zorge sekigita. Sur ŝia korpo estis disvastigita glatiga kremo. Ŝi ŝmiris

parfumon sur la akselojn, la bruston, la kolon, la kruron, la femurojn... Poste ŝi iris al la lito. Ŝi kolektis siajn vestojn kaj pendigis ilin en la ŝranko. Ŝi malkovris la litkovrilon, kaj antaŭ ol enlitiĝi, ŝi diris al si ŝance ke..., kaj malfermis la pordon de la ĉambro. En la koridoro estis neniuj. Ŝi lasis la pordon tiel, ke ĝi ŝajnis fermita, sed sen la seruro ĝin bloki, tiel ke sufiĉis puŝi ĝin per fingro por ĝin malfermi.

Ŝi kuŝiĝis, kaj sen kovri sin per la litotuko, ŝi fermis la okulojn kaj penseme kuŝis tie, sur la lito. Ŝi povis aŭdi tion, kiel la aero eniris kaj eliris el ŝiaj pulmoj, sub lia malavara brusto. Ŝi eĉ aŭdis la batadon de sia koro. Tiun ŝi pretis transdoni al tiu knabo, se li petos ĝin, kvankam ŝi suspektis, ke ŝi jam transdonis ĝin al li. Kaj kun tiu penso, kiu igis ŝian haŭton rampi ĝis ekstretoj, kiujn ŝi ne kredis eble, kun tiu agrabla sento havi anseran haŭton, ŝi endormiĝis kun rideto sur la lipoj.

Du horojn poste ŝi sentis varman tuŝon sur sia maldekstra vango. Ŝi turnis sin al tiu flanko kaj ĵetis brakon kaj kruron super la viron, kaj reendormiĝis. Estis bela sonĝo. Ĉi tiu viro ne havis vizaĝon, sed lia tuŝo estis mola. Kaj karesis ŝin. Li karesis ŝian hararon, ŝian dorson, ŝian bruston.

Subite ŝiaj okuloj larĝiĝis. Io skuis ŝin el la sonĝo. Kaj tamen estis la viro, karesante ŝin. Ŝiaj propraj haroj kovris sian vizaĝon kaj tial ŝi

unue ne povis distingi liajn trajtojn. Ŝi forpuŝis ilin de siaj okuloj per unu mano, kaj tiam ŝi vidis lin sub la nokta lumo venanta tra la fenestro: jen ŝia juna amo.

«Vi venis», ŝi diris al ŝi flustre.

«Antaŭ du horoj».

Ŝi rigardis la horloĝon kaj vidis, ke estas la kvara matene.

«Vi malfruis».

«Mi devis pensi».

«Vi estas vestita».

«Jes. Ekscitas min esti vestita en lito kun nuda virino».

Ŝi ridetis.

«Via rideto estas bela».

«Dankon».

Li karesis ŝian hararon kaj posteĉaste kisis ŝiajn lipojn. Ŝi dankis lin kun rideto kaj pasie rekisis lin.

«Mi amas vin».

«Tiu estas grandaj vortoj, Filomino».

«Mi jam scias. Mi estas stulta, sed mi amas vin».

«Vi ekenamiĝas facile».

«Vi estas stranga junulo. Mi pensis, ke ĉiuj viroj volas enmeti ĝin kiam ili povas, sen kompliki siajn

vivojn. Jen ĉi tie mi, duan fojon nuda en via lito, kaj vi estas vestita kaj ne profitas la situacion».

«Mi preferas, ke vi estu kun mi ol profiti de vi kaj malaperi. Ne estas magio en fiko, sed estas magio por malkovri en via koro».

Tio tute vekis ŝin. Kion diras tiu ĉi ulo? Ŝi ne plu vidis lin kiel la ĝenata vagaĉo, kiu petis de ŝi helpon. Ŝi vidis lin kiel homon multe pli maljunan ol ŝi, plenan de saĝo. Ŝi sentis sin kiel senhelpa infano serĉanta protekton. Lian protekton.

Ŝi ĉirkaŭbrakis lin per brakoj kaj kruroj, kaj ekdormis, laca.

En la lumo de tagiĝo sonoris la vekhorloĝo de ŝia poŝtelefono, kaj ŝi malfermis la okulojn. Ŝi estis sola. Jes, ĝi estis sonĝo. Ŝia amo ne vizitis ŝin tiun nokton. Ŝi komprenis.

Inter malkonvenaj singultoj ŝi vestis sin. Poste ŝi faris sian hararon kaj ŝminkon, matenmanĝis en la hotelrestoracio kaj iris labori.

En la mezo de la mateno li telefonis al ŝi.

«Filomino, ĉu vi volas veni danci kun mi ĉi-vespere?»

«Ĉu al diskoteko?»

«Pli bone: al balsalono».

«Ĉu vi scias danci?»

«Jes ĝuste».

«Mi ne scias. Mi neniam estis en dancejo. Kiam mi estis juna mi kutimis iri al diskotekoj kun miaj amikinoj...»

«Ne gravas. Vi lasas vin teni, kaj jen».

«Bone. Kioma horo?»

«Ĉu la oka estas bona por vi?»

«En konsento. Ĝis la oka do».

«Atendu, atendu!»

«Kio?»

«Donu al mi vian adreson, por ke mi iru serĉi vin».

«Ni renkontu tie pli bone, ĉu ne? Vi diru al mi la adreson de la balsalono».

«Mi serĉos mian knabinon kaj akompanos ŝin sekure al ŝia domo».

Pri tiuj, kiuj ne plu estas, ŝi diris al si kun sento de dankemo. Kaj ŝi donis al li sian adreson.

Je la oka vespere ŝia koramiko estis tie vestita per eleganta kostumo kaj lavumaj ŝuoj. Ŝi ankaŭ zorge pretigis sin: ŝi iris posttagmeze al la frizisto por ripari la harojn, poste ŝi faris longan banon, ŝi mildigis la haŭton de la tuta korpo per speciala kremo, kaj ŝi parfumis ĝin. Ŝi ankaŭ imagis multajn aferojn, kiel la adoleskantino, kiun ŝi neniam vere estis.

Tiun nokton li instruis ŝin al valso, salso, bachata, loza kaj streĉa.

Dancante tre malrapidan pecon, brakumante lin, kaj kun la kapo apogita sur lia ŝultro, ŝi glitis al li Mi amas vin por la dua fojo.

Li respondis kisanter ŝin.

Kiam ili sidiĝis por ripozi, li diris al ŝi ion novan:

«Estas neeble ne ami cin».

Ŝi kaptis lian manon kaj kisis ĝin. Tiam ŝi alportis ĝin al sia brusto:

«Vi povas havi min», ŝi diris al li, «tiom longe kiom vi volos».

Du horojn poste li irigis ŝin hejmen.

«Ĉu vi ŝatus drinki ion?» ŝi demandis.

Li rigardis ŝin ame kaj diris:

«Mi ne volas ĝeni ciajn gepatrojn».

«Ne estas gepatroj. Mi loĝas sole».

«Ha, nu, tiaokaze mi ne povas rezisti tian proponon».

Ili havis kelkajn mielajn rumojn, poste sidis sur nigra leda kanapo. Ŝi demetis siajn ŝuojn kaj metis siajn piedojn sur lin, ridetante dum ŝi drinkas la rumon.

«Mi finfine havas vin tie, kie mi

volas...»

«Ĉu sur cia kanapo?»

«Sur mia kanapo. Nun vi estas mia.»

«Mi estas cia de kiam mi vidis vin, tiun tagon ĉe via laboro».

«Ĉu vi enamiĝis unuavide?»

«Mi kredas, ke antaŭe. Dum mia tuta vivo mi serĉis cin. Mi trovis cin kiam mi fuŝis la deklaron».

Tiun nokton ili ja amaris.

«Mi volas», ŝi diris al li, «ĉi tion fari ĉiunokte».

«Ĉu ne plu hotelo?»

«Ĉi tio estas via domo. Mi donos al vi ŝlosilon. Mi ŝatus vidi vin kiam mi revenos de la laboro».

«Mi akceptas cian ŝlosilon, sed estas antaŭtempe por mi forlasi miajn gepatrojn».

«Jes, paĉjo», ŝi diris sarkasme. «Vi ĉiam tiel matura. Ĉiam farante dece».

«Ci ekprenis min», li diris.

Ŝi ridetis pro la absurdaĵo de la penso.

«Ŝajnas, ke vi estas en viaj kvindekaj kaj mi estas en miaj dudekaj».

«La kvara de majo. Ĉu tiu dato

diras al ci ion?»

«Jes. Kial vi demandas?»

«Ĝi estas la hotelĉambro, kie ci proponis al mi cian nudaĵon dufoje: 405, 4 05».

«Vi ne venis la duan fojon».

«Mi iris je la dua matene. ci dormis. Je la kvara ci vekigis. Ni interparolis, sed ci denove ekdormis. Antaŭ la tagiĝo mi forlasis al mia domo, ĉar mi devis prepariĝi por iri al la universitato, al klaso».

«Ĉu vi venis? Ĝi ne estis sonĝo...»

«Ne. Ci diris tre belajn aferojn».

«Ĉu magio. Esti kun vi estas kiel sonĝo por mi. Neniam forlasu min».

«Lasu la estontecon trankvila. Carpe Diem...»

«Jes, Horasjo: Carpe diem, quam minimum credula postero: Ĝuu ĉi tiun tagon, kaj havu minimuman konfidon en la estonteco. Vi estas skatolo da surprizoj».

«Vuf. Vi. Vi estas la unua virino, kiun mi konas, kiu scias la kompletan diraĵon. Vi estas simple mirinda: saĝulino en la korpo de diino».

Kaj denove kisis li la diinon.

«Sed ci ne diris al mi, kial la kvara de majo estas grava por ci», li diris al ŝi.

«Tio estis la tago, kiam mi estis la laste eksedziĝinta, antaŭ kvin jaroj. Sed mi ne elektis tiun ĉambron, ne la unuan fojon. Estis hazardo. Tiam mi ja petis ĝin sed ĉar mi volis, ke ĝi estu nia ĉambro. Sed ĝis vi menciis ĝin mi ne vidis la rilaton».

Tiun jaron li finis sian karieron en Historio. Li faris magistran kurson pri la Eŭropo de la 20-a Jarcento, kaj kiam li jam estis mergita en sia doktora tezo pri la Hispana Enlanda Milito, ŝi surprizis lin per novaĵo:

«Mi estas graveda».

Kontraŭ tio, kion ŝi atendis, li ridetis.

«Ni bone prizorgos lin, aŭ ŝin».

«Ĉu vi ne koleras? Mi povas aborti».

«Kio okazus al ci, se cia patrino estus farinta tion?»

«Ŝi... ŝi mortis», ŝi diris tre malĝoje.

«Kial?»

«Mi neniam diris al vi. Mi diris al vi, ke miaj gepatroj mortis kiam mi estis infano. Sed mi ja konis mian patron. Mia patrino mortis kiam mi naskiĝis. Akuŝante min».

«Jes, kompatinda Sandrino», li ekbalbutis.

«Kio? Mi neniam diris al vi la

nomon de mia patrino».

«Ĉu ŝia nomo estis Sandrino?»

«Jes».

«Ve, ĝi estas koincido. Ci rememorigis min pri amikino mia, kies nomo estis Sandrino. Ŝi ankaŭ mortis en akuŝo, antaŭ jaroj. Mi pensas, ke la knabino estis edukita de sia avino, Fabiolino».

«Kio!»

«Kio kio?»

«Fabiolino estis la nomo de mia avino. Ŝi edukis min».

«Ve, alia koincido».

Ili longe rigardis unu la alian. Ŝi estis certa, ke ŝi konas lin de antaŭe. Sed ŝi ne sciis kiam nek kie.

«Mi venas loĝi ĉe vi, Filomino, Tiu, kiun ŝiaj gepatroj volas».

Tiutage ŝia knabo estis pli stranga ol kutime.

«Tion diris al mi mia avino».

«Kion ŝi diris?»

«Ke miaj gepatroj deziris infanon dum multaj jaroj. Kaj kiam ili fine eksciis, ke mi venos, kaj ke ĝi estos knabino, ili donis al mi tiun nomon: Tiun, kiun iliaj gepatroj amas, Filomino. Tial mi tiom ŝatas mian nomon».

«Kaj tamen ci konis neniun el ili».

«Mian patron jes, mi konis. Li mortis kiam mi estis dekjara».

«Jes, li mortis en stulta aŭtoakcidento».

«Kiel vi scias?»

«Ci diris al mi».

«Ne».

«Ci foje parolas dormante. Tiel ci diris al mi. Nu, ci diris ĝin kaj mi estis veka kaj mi aŭdis ĝin. Kaj ci diris pli da aferoj dum via dormo».

«Ho ĉu? Mi ne sciis tion. Mi neniam suspektis, ke mi havas dorman paroladon».

«Cia avino neniam diris al ci. Ne cialaj edzoj...»

«Nu ne».

«Eble ili ne aŭdis cin, aŭ ili okupiĝis pri aliaj aferoj. Mi observas cin kiam ci dormas. Foje mi vekigis kiam ni dormas kune. Kaj mi prenas cian manon. Mi kisas cin, kaj mi observas cin dum horoj».

Tio estis sindonemo. Ŝiaj okuloj malsekiĝis.

«Ni ne povas havi ĉi tiun infanon».

Li rigardis ŝin kun senfina kompatato.

«Kompreneble ni havos. Kial ci diras ne?»

«Ĉar kiam li estos pli maljuna kaj bezonos min, mi estos sepdekjara».

«Kaj mi estos junulo kvardekjara. Kaj sekve?»

«La normala afero estas, ke mi mortos ĉirkaŭ tiu aĝo. Kion li faros sen sia patrino?»

«Ci eble vivos multajn pliajn jarojn. Kaj mi prizorgos vin ambaŭ».

«Vi ne volas vivi kun mi...»

«Mi jam diris al ci. De ĉi tiu momento mi vivas kun vi, mia filino. Mi ne forlasos cin denove, ne».

Tio senarmigis ŝin. Ĉu mia filino? Ĉu tiu junulo ĵus diris al li, ke li estas ŝia patro?

«Kio, mia filino?»

«Ĝi estas maniero paroli. Aminda nomo. Mi estas sufiĉe maljuna por esti cia filo, ne cia patro».

«Jes? Kaj ĉion, kion mi rakontis al vi en sonĝoj?»

«Ne, ne saltu al absurdaj konkludoj. La vivo estas pli simpla ol ci pensas, Filomino».

Filomino ne plu vivis sola. Dum la naŭ monatoj da gravedeco ŝia koramiko estis kun ŝi. Liaj gepatroj venis viziti ilin ofte. Lia patrino, Águeda, estis ĉarma kvardekjaraĝa, kiu ne komprenis, ke ŝia filo loĝas kun virino pli aĝa ol ŝi. Arturo, ŝia edzo, ja komprenis, ĉar Filomino

estis tre bela kaj estis nature, ke ŝia filo ŝatis ŝin. Aldone, Filomino kaj li, Arturo, estis samklasanoj en lernejo, kvankam ŝi ne plu memoris pri tio. Sed tio, kion ili ambaŭ ŝatis, estas, ke tiu ĉi kvindek-jara virino faros ilin geavoj. Post kelkaj monatoj.

Kaj estis tempo por naski. Male al ŝia patrino, Filomino ne mortis en ĝi. Fakte ŝi mortos kvindek ses jarojn poste.

Kiam ŝia koramiko vidis sian filinon eliri en la mondon, li ne povis ne krei:

«Sandrino!»

«Kio?»

Kiam la feliĉa patrino jam estis en sia ĉambro mamnutrante sian filinon, ŝi demandis:

«Kiel vi sciis, ke mi volas nomian filinon laŭ mia patrino?»

«Mi ne sciis, mi ne sciis ĝin».

«Kial vi diris Sandrino kiam vi vidis ŝin?»

Unuafoje de kiam li konis ŝin, li estis senvorta.

«Vidu, Filomino, mi ne estis tute honesta kun ci...»

«Ĉu vi jam estas edzo?»

«Ne».

«Do..?»

«Mi estis tre singarda, sed mi havis du malsukcesojn. Ne prenu ĝin malbone...»

«Kion mi ne malbone prenu?»

«Ci vidos. Iuj diras, ke kiam oni mortas, oni renaskiĝas...»

«Jes, la teorio de reenkarnejo, de karmo kaj ĉio tio».

«Oni diras, ke oni mortas, kaj ke kiam li renaskiĝas, li ne memoras siajn antaŭajn vivojn».

«Tion oni diras».

«Sed foje tio fuŝas».

«Kiel ĝi fuŝas? kion vi celas diri?»
Certe, ĉi tiu viro hodiaŭ estas stranga, ŝi pensis. Pli ol kutime.

«Nu, mi ja memoras».

«Pri kio?»

«Pri mia antaŭa vivo.
Kristalklare».

Ŝi rigardadis lin tre longe. Li ankaŭ rigardis ŝin, ŝajne embarasita doni al ŝi malbonajn novaĵojn. Dum longaj minutoj aŭdiĝis nur la suĉo de eta Sandrino, kiam ŝi eltiris la nektaron de la vivo el la cico de sia patrino.

«Kion vi faris en via antaŭa vivo?»

«Mi estis ĵurnalisto».

«Ĉu vi edziĝis?»

«Jes».

«Ĉu vi havis infanojn?»

«Filinon».

En tiu momento ŝajnis al ŝi, ke al ŝi mankas spiro.

«Pro kio vi mortis?»

«Pro aŭtoakcidento».

«Daŭrigu. Rakontu al mi pri via edzino».

«Ŝia nomo estis Sandrino».

«Ĉu ŝi mortis en akuŝo?»

«Tiel estas».

«Ĉu vi estas mia patro?»

«Mi bedaŭras diri al ci tiel, sed mi neniam mensogis al ci, kaj mi ne faros nun, nek iam».

«Ĉu vi estas tio?»

«Jes, filino mia. Mi forlasis cin kiam ci plej bezonis min. Sed mi ne forlasos cin denove dum cia tuta vivo, mi esperas».

Ŝi staris en profunda ŝoko, senvorte, nenion dirante, rigardante en la spacon preter li. Lia filino ekdormis. Venis flegistino kaj rigardinte de unu al la alia, prenis la knabinecon kaj enlitigis ŝin en la lulilon, kiu estis apud la lito.

Pli ol duonhoron poste, Filomino sukcesis diri:

«Do ĉi tio estas incesto. Kaj nia filino estas abomeninda».

«Ne, Filomino. Mia korpo, mia DNA, havas nenion komunan kun tiu, kiu naskis cin en la korpo de Sandrino. Miaj gepatroj nun havas nenion komunan kun tiuj, kiujn mi havis tiam».

«Do vi kaj mi...»

«En ĉi tiu vivo ni estas kongruaj. Ni havos pli da infanoj».

«Mi ne povos fari ĝin, patro».

«Bonvolu ne nomi min tiel. Mi estas la patro de cia filino, sed mi ne plu estas cia patro».

«Fek'!. Mi volas, ke vi diru al mi ĉion. Ĉion, kion vi ne diris al mi kiel infano».

«Mi klopodos».

«Kiom aĝa vi estis kiam vi mortis?»

«Kvardek kvin».

Ŝi aldonis: $45+21=66$. Jes, tre oportuna aĝo por gravedigi knabinon de 51. Nun ŝi komprenis ĉion.

«Kaj vi serĉis min».

«Jes. Dekdujara mi jam sciis, kie ci loĝas. Mi observis Fabiolinon. Estis tre malfacile ne povi saluti mian patrinon. Sed doloris min vidi ŝin, ni ne scias kial. Devas esti pro io esotera, kiun mi ne komprenas...»

Sed ŝi daŭre aldonis. Kvardek unu jarojn pli frue lia patro mortis. Li do naskiĝis antaŭ 20 jaroj, kio kreis breĉon de 21 jaroj. Alivorte, se lia patro ne estus mortinta, li nun havus 92 jarojn.

«Ĉu vi scias? Mi kreskis tre soleca. Mi bezonus tiam mian patron».

«Ĝis via 23^a jaro mi ne naskiĝis. Kaj se mi estus dirinta tion al ci antaŭe, ci estus sendinta min al la azilo por mensaj handikapuloj...»

«Ne. Nun ĉio taŭgas».

«Kaj nun, kion vi volas fari?»

«Nun ni geedziĝos. Antaŭe vi estis unika por mi. Nun vi estas tia kvadratite», kaj kapjesante al sia filino, ŝi aldonis: «Paĉjo».

«Kion ajn ci diros, karulino».

La kvara geedziĝo de Filomino estis la plej longa. La interparoloj kun ŝia edzo fariĝis eĉ pli profundaj kaj senfinaj. Jes, ŝia filino Sandrino estis ŝia patrino, kvankam ŝi ne memoris sian pasintan vivon. Sed ili interkonsentis nomi ŝin ne per tiu nomo, Sandrino, sed tiu de tiu Sankta Virino, Fabiolino, tiu, kiu kultivas fabojn. Tiu, kiu plantis amon en ŝian menson de la tempo kiam ŝi naskiĝis ĝis ŝi devis foriri.





Kajeroj el la Sudo



Bulteno de Hispana Asocio
de Laboristoj Esperantistaj

<http://www.gazetoteko.com/hale/kels123.pdf>

Numero 123- Aprilon 2022



ISSN 1886-1938 (printita)
ISSN 1886-1997
Depósito legal: Z-2398-88